# Nova Vivo®

Pierre Bordage

©Librairie L’Atalante, *Nouvelle vie*™, L'Atalante, 2004

Tiu tradukado estas farita de la grupo "La Rondo" kaj provlegita de Russ Williams.

https://creativecommons.org/licenses/by-nc-nd/4.0/legalcode

Ili aperis matene je la kvina. Viro kaj virino estas vestitaj en perlgrizaj uniformoj. Senditoj de Nova Edeno, sendube. Li ne sukcesis taksi iliajn aĝojn – cetere, estas malfacile taksi la aĝojn de loĝantoj de Nova Edeno, kies plejparto devenas el regionoj de Nordameriko, Eŭropo kaj Aŭstralio; ili nur malofte elmoviĝas el la flosantaj urboj, kie ili izoliĝis jardekojn pli frue.

Misvekita, li sin demandis, kion tiuj ĉi du uloj umas antaŭ la pordo de lia apartamento, kiu ennestiĝas ĉe la koro de malnova Parizo. Li pligrandigis iliajn vizaĝojn sur la spionekrano de la vestiblo.

"Fekproblemojn", li legis sur iliaj trajtoj tamen senpasie.

Antaŭ kvar tagoj li festis sian tridek kvinan naskiĝtagon. Okazo por starigi la unuan bilancon de sia vivo. Li kvazaŭ bone elturniĝis kiel ulo, kiu perdis siajn gepatrojn en la aĝo de naŭ jaroj. Kvankam li konservis de sia patrino la ĉifitan bildon de adoleskantino kun freneza hararo, malvigla rigardo kaj laca rideto, li ĉion forgesis pri sia patro. Tamen li rememoris horojn, kiuj antaŭis ilian malaperon, kiam la nokto estis engluita en humida varmego, kaj voĉoj ekbruegis tra la maldikaj vandoj, kaj la ĝemploroj estis dampitaj, kaj la paŝoj bruis, kaj la pordo estis milde fermita, kaj la silento revenis iom post iom en la loĝejo. Li reendormiĝis, li baraktis ĝis la tagiĝo en koŝmaroj, li vekiĝis kun sufoka sento de timo kaj soleco. Du viroj atendis lin en la kuirejo, vestitaj en grizaj uniformoj. Li demandis ilin, kie malaperis liaj gepatroj. Sen eĉ unu vorto, ili kondukis lin al orfejo en la malsupra urbo. Tie, li estis desinfektita, vakcinita, nutrita, loĝigita, poste, ĉar li montris iun kapablon pri matematiko, oni instruis al li la profesion de vickontisto. Li neniam ricevis novaĵojn de siaj gepatroj. Nek liaj instruistoj nek liaj edukistoj respondis al liaj demandoj. Sufiĉe bone prizorgita, li iafoje suferis pro soleco, precipe dum someraj noktoj, tiuj gluecaj horoj, kiam li sendorme turniĝis kaj turniĝadis en siaj litotukoj. El tiu epoko, restis kelkaj kamaradoj, kiujn li renkontpasis fojfoje sur la labirintaj malhelaj kaj malpuraj stratetoj. Tiam ili trinkis bieron ĉe la bufedo de iu drinkejaĉo de la malsupra urbo, provante revigligi la malbrilajn kolorojn de sia infaneco kaj adolesko. Eĉ donante dudek procentojn de sia salajro al la orfejo, li sufiĉe gajnis sian porvivaĵon, por ĉiukaze pagi decan loĝejon kaj enskribi sian filinon en bonfama lernejo.

Lizbeto, lia perlo, la pupilo de lia okulo.

La virino vestita en griza uniformo malpacience paŭtis antaŭ ol duafoje sonorigi ĉe la pordo. Panika ondo skuis lin de la kapo ĝis la piedoj. Eble ili estis komisiitaj de sociaj servoj? Eble ili taksis lin nekapabla sole eduki sian filinon?

La sinmortigo de lia edzino tiam malpezigis lin. Deprimata ekde la naskiĝo de Lizbeto, ŝi restis dum la tuta tago kuŝaĉante sur sofo kiel foko, kiu surgrundiĝis sur plaĝo, fiksrigardante la salonan murekranon, malatente manĝetante sukerajn kaj salitajn aĉaĵojn, kiujn ŝi mendis per la eksmoda TTT – la truita Reto, la mafiema Reto, la putra Reto, kie ĉiuj intrigis, kie tajpi kontkodon estis kiel banke harakiri.

Iun vesperon, rehejmiĝinte post la laboro, li trovis ŝin morta sur la sofo; apud ŝi, Lizbeto estis finmanĝanta paketon da ĉipsoj, fascinita de la nova reto-realaĵo de kanalo 798a – la ĉiutaga vivo de afrikaj familioj, kiuj obstine postvivas ĉe rubmonto; la prezentisto alvokis voĉdoni por sia preferata familio, 2,80 eŭrojn por ĉiu voĉdono; tiu, kiu kolektas la plej malmultajn voĉojn estos eliminita; al la gajnanta familio estos ekskluzive konfidita la ekspluatado dum dek jaroj de la rubmonto.

La kuracistoj konkludis pri LĈV – libervola ĉesigo de vivo – per amasa sorbo de barbituraĵoj. Li ne aŭdacis kontesti ilian diagnozon, kvankam sia edzino neniam vidigis la plej etan voleton de sinmortigo. Malgraŭ ĉio, kiu povis scii tion, kio teksiĝis en la cerbo de kreito reduktita al stato de larvo per trouzado de graso kaj bildoj? Oni kremaciis ŝin laŭ la minimuma ceremonio – mil eŭrojn tamen – poste oni iris kun la funebra urno al la bordo de la Cindrofosaĵo, putra marĉeto kun artefaritaj vento kaj ondoj, kie, de post la malpermeso enterigi kadavrojn, la plejparto de familioj disigis la cindrojn de siaj mortintoj.

Lizbeto ne suferis la abruptan malaperon de sia patrino. Eĉ male: la naŭzita ridgrimaco, kiun ŝi hejme afektadis, foriĝis de ŝiaj lipoj. Li ne deziris alian edzinon, unue ĉar li tre rapide retrovis la komforton de senedzineco, poste ĉar li ne volis trudi duonpatrinon al Lizbeto. Li fordiboĉis la seksan energion unu aŭ du fojojn ĉiusemajne kun la junaj – foje tre junaj – kaj lindaj ĉiesulinoj de la strato Volupto.

La virino sonorigis denove kaj elpoŝigis el la uniformo pasŝlosilon, elektronika ŝlosilo kiu malkodas kaj cedigas ajnan seruron. Iu eta teknologia mirindaĵo rezervata por policistoj kaj aliaj ĵurintaj cerberoj el la malsupra lando. Do temis pri oficiala hejma vizito. Estis pli bone malfermi al ili, prefere ol lasi ilin laŭleĝe fuŝfari la seruron *Ok-T-puŝi* – du mil eŭroj por la sekursistemo, ok seruroj, ok kodoj, ok baroj kontraŭ senskrupula vizitanto. Li aktivigis la eksteran mikrofonon.

"Unu sekundon, mi malfermas al vi."

Li bezonis multe pli ol unu sekundo, per sia tremanta montrofingro, por premi la klavojn de la sentila klavaro enfiksita en la pordokadro. La pordo forglitlis en la muron. La virino enpoŝigis sian elektronikan pasŝlosilon en sian uniformon, la viro fiksrigardis lin kun nedivenebla rideto.

"Sinjoro Kvint?"

Li kapjesis. De longe oni ne nomas lin sinjoro Kvint. Por siaj kolegoj li estis Jeremio aŭ Jem', laŭ la grado de ilia simpatio, por Lizbeto li estis paĉ' aŭ paĉjeto, por la ĉiesulinoj de la strato Volupto li estis mia lupĉjo, mia kara, mia kaĉjo, mia kaproĉjo aŭ mia trezoro.

Li flankenmoviĝis por inviti ilin eniri. Ili ne atendis la permeson por enfali en la salonon kaj por sidiĝi sur la sofon aĉetita unu semajnon post la morto de sia edzino. Li subŝovis la antaŭan, tute fuŝitan, al rekuperistoj de malnovaĵoj, kies kovritaj ŝarĝaŭtoj trairadis la stratetojn kaj placojn de la malsupra urbo. Li duonsidiĝis sur tabureto kaj metis unu kubuton sur la alta tablo, kiu apartigas la kuirejon de la salono.

"Kiu vi estas kaj kion vi volas?"

La virino iel gracie movis la kapon antaŭ ol respondi:

"Ni venas por serĉi nian pagendaĵon, sinjoro Kvint."

"Vian... pagendaĵon?"

Enigma rideto denove aperis sur la lipoj de la viro. Li kaj lia kolego aspektis kiel paro de elstaraj parolistoj de tele-retoj, kun egalaj trajtoj, hela kaj glata haŭto, densa kaj iomete onda hararo.

"Ni laboras por la firmao Vivo®. Ĉu vi konas la firmaon Vivo®?"

"Mi aŭdis pri ĝi. Bioteknologia farejo, mi kredas."

"La plej granda bioteknologia entrepreno sur nia planedo," korektis la virino. "Ĝi posedas naŭdek procentojn de patentoj."

"Ege feliĉa por vi. En kio tio koncernas min?"

"Genopatentoj, sinjoro Kvint. La genaroj."

Kelkajn tagojn pli frue li aĉetis bonegan refortigan teon kun kafa gusto; la ideo proponi al ili tason da teo ne venis al li en la kapon. Ili vekis en li nenian simpation.

"Do vi vekis min je la kvina matene por sciigi min, ke via kompanio superigas la merkaton de genetikaj patentoj, ĉu?"

La virino ekigis malaproban paŭton, tuj forigita de tiu enigma rideto kiu, ĉe ŝi kaj ĉe ŝia kolego, pensigas stampon, fabrikmarkon.

"La patentoj intime koncernas vin, sinjoro Kvint."

"En viaj genoj troviĝas apartaĵo, kiu multe interesas Vivon®," aldiris la viro.

"Gena mutacio."

"Ĉu vi malsaniĝis eĉ nur unufoje dum via vivo?"

Almenaŭ unu minuto necesis al li por kompreni la demandon, kaj du pluaj por rapide elbobenigi sian vivfadenon. De kiam li memoris, li neniam malĉeestis la lernejon nek la laborejon pro malsano. La aliaj, liaj kolegoj aŭ gepatroj de amikinoj de Lizbeto, tutjare kaptis malsanojn, kiuj alnajlis ilin unu semajnon al lito, aŭ, kelkfoje, senrevene forte trafis ilin. La klimatŝanĝo, konstantaj varmeteco kaj humideco, faciligis la proliferadon de bakterioj kaj virusoj en la aero kaj akvo. Ni devis boligi la kranakvon kaj aldoni al ĝi klorajn pastelojn antaŭ ol trinki ĝin, kio ne malhelpis novajn malsanojn aperi ĉiumonate.

"Neniam..."

"Ni deduktas, ke via imunsistemo estas tre efika, sinjoro Kvint," diris la virino.

"Samkiel tiu de viaj gepatroj," aldiris la viro. Tiel efika, ke Vivo® patentis ĝin."

Tiuj vortoj efikis sur lin kiel elektroŝoko. Bildoj revenis al li kun mirega kaj emociega klareco. Li revidis la simbolojn broditajn sur la uniformoj de la du viroj, kiuj gastigis lin en la kuirejo matene, kiam liaj gepatroj malaperis, unu V en cirklo.

"Vi tuj diras al mi, ke... ke via firmao patentis la genaron de miaj gepatroj, ĉu?"

La virino paŭtis al li por kuraĝigi lin, kiel instruisto paŭtis al lernanto tuj solvonta malfacilan ekvacion.

"Sed… oni ne rajtas aĉeti homojn…"

Dum li prononcis tiujn vortojn, la vero trudiĝis al li, terura, nekonceptebla.

"Ĉio estas vendebla, sinjoro Kvint. Ekde la afero Erkhan', en 2023, la Unuiĝintaj Nacioj akceptis la principon patentigi la homan genaron. Kondiĉe ke lagenaro prezentas rimarkindan apartaĵon kaj kontribuas al la progreso de la homaro."

Per kapmovo, li provis forpeli la subitan lacon, kiu pezas sur la nuko.

"Estis via firmao, kiu forprenis miajn gepatrojn antaŭ dudek ses jaroj, ĉu ne?"

La viro elpoŝigis paperfolion el sia uniformo kaj zorge disfaldis ĝin.

"Ili estis ruinigitaj, sen vivrimedoj, sen estonteco. Ili akceptis la kondiĉojn de ĉi tiu kontrakto kontraŭ parta subteno por sia infano. Nia firmao plenumis sian parton de la kontrakto."

"Kio okazis al ili?"

La viro delikate kuŝigis la disfalditan folion sur la tableton kaj glatigis ĝin per la manplato.

"Ni ne scias tion. Ili estis transdonitaj al teknikistoj.La klaŭzo de konfidenco malpermesas nin...

"Kion do vi faras ĉe mi, se vi nenion sciigas al mi pri ili, damne?"

Li tuj bedaŭris sian voĉeksplodon kaj turnis sian kapon al la pordo de la dormoĉambro de Lizbeto. La rigardoj de la viro kaj la ino de Vivo® sekvis lian kun la rapideco de falkoj postĉasantaj kaptaĵon. La silento revenis en la loĝejon, maltrankviligata de la vekiĝo de la malsupra urbo, de sibladoj de fruaj aeraj metrooj, de muĝoj de fruaj busoj, de krioj de fruaj kafostratvendistoj.

"Viaj gepatroj engaĝis ne nur sin, daŭrigis la virino."

"Kion vi volas diri?"

Ŝi momente silentis antaŭ ol respondi.

"Ili vendis al Vivo® rajtojn al tri generacioj."

Li preskaŭ ekridegis. Stulta reflekso. La diroj de tiuj du aviduloj neniel estis ŝerco. Li ekŝvitis en sia larĝa banmantelo donacita de Lizbeto okaze de la lasta patrofesto. Li ekrigardis tra la larĝa fenestro, kies dika kaj lamena vitro transformis en meteorojn la lumojn de busoj kaj trajnoj. La apartamento ne situis en la plej kvieta kvartalo de Parizo, sed ĝi avantaĝege situis duonvoje inter la lernejo de Lizbeto kaj lia propra laborejo. Krome, oni ankoraŭ povis distingi la ĉielon super la koro de la pariza aglomeraĵo, super kiu pro evidentaj sekurecaj kialoj, flosantaj urboj ne rajtis superflugi.

"Neeble! li flustris. La novaj homrajtoj..."

"... ne plu signifas multe en nia epoko," interrompis la viro. "Nia firmao referencas al dekreto de la 13a de julio 2024."

"Vi sendube aŭdis pri la juĝafero Chalbot[1]," precizigis la virino. "Tiu familio de Liono protestis kontraŭ la juĝa valideco de la cent-dudek-jara prunto prunteprenita de prageavoj. El tiu rezultas, ke kontraktoj subskribitaj de prauloj nepre engaĝas la idojn."

Ŝi denove paŭzis antaŭ ol aldiri:

"Vi estas patentita, sinjoro Kvint. La kontrakto subskribita de viaj gepatroj engaĝas vin. Vi tute apartenas al Vivo®. La laboratorio delegas nin por preni vin."

Li restis dum momento ŝtonigita sur la tabureto, nekapabla esprimi penson, ekfari geston.

"Neeble," li balbutis. "Vi ne rajtas, mi ne povas lasi mian filinon sola."

"Nia firmao zorgos pri ŝi, kiel ĝi zorgis pri vi."

"Mi ne volas, mi ne volas…"

La trajtoj de la virino iĝis malmildaj.

"Mi memorigas, ke vi ne havas decidopovon, sinjoro Kvint. La laboratorio postulas hodiaŭ vian ĉeeston, viajn genojn."

Li salte leviĝis de la tabureto kaj, abrupte, detiris manplenon da siaj haroj.

---

1 Chalbot [Ŝalbo]

"Prenu ĉi tiun ekzempleron kaj elturniĝu per tio! Mi ne sekvos vin."
"Viaj haroj ne sufiĉos, mi timas," vigle diris la viro per perfekte regata voĉo. "La laboratorio postulas vian ĉeeston por esplori viajn organajn reagojn al iaj stimuloj."
"Mi ne estas fia kobajo!"
"Ne estu sendanka, sinjoro Kvint: Vivo® donis al vi viajn dudek ses plej belajn jarojn da libereco."
Vualo de nebulo disŝiriĝis en lia menso.
Li retrovas sin kuŝanta sur sia lito dudek ses jarojn pli frue, ŝvitante, anhelante, kvazaŭ elirante el koŝmaro. Obtuzaj bruoj dronas en la gluanta tenebro. Li rekonas la voĉojn de panjo kaj de paĉjo, kaj alian, pli malaltan, kiun li neniam aŭdis.
"Kondiĉe ke vi ne venos preni lin antaŭ ol li havos kvindek jarojn," ĝemas panjo.
"Tridek jarojn," diras la nekonata voĉo. "Kaj, kiam li estos fininta sian klerigadon, li redonos dek procentojn de sia salajro al nia firmao."
"Tridek? Ne sufiĉe longe por vivi valoran vivon," protestas paĉjo.
"Ni kompromisu," sugestas la nekonata voĉo. "Ni ne reprenos lin antaŭ ol li havos kvardek jarojn. Kompense, ni garantias al li nur mezvaloran klerigadon kaj li ŝuldos al ni dudek procentojn de sia salajro."
"Kion signifas mezvalora?"
Silento. Nehoma krio ŝiras la nokton. Eble agresata pasanto. Aŭ najbara dormanto turmentata de premsonĝo.
"La listo de profesioj, kiuj kongruas kun mezvalora klerigado," aldiras la nekonata voĉo. "Enirnivela ŝtatoficisto, vickontisto, sekciestro en superbazaro, komercisto…"
"Vickontisto, do!" ekkrias panjo.
Ŝi ĉiam senlime admiregis profesiojn de ciferoj, ŝi mem estante nekapabla aldoni du nombrojn inter unu kaj naŭ.
"Ni do baziĝas sur la jena kontrakto: via filo estos reakirita de la laboratorio je la aĝo de kvardek jaroj. Kompense li sekvos klerigadon kiel vickontisto kaj donos dudek procentojn de sia salajro al la kleriga institucio. Ĉu ni ja konsentas?"
Panjo ekploras, paĉjo aprobas per neklara grumblado.
"Mia Dio, en kia mondo ni vivas?" balbutas panjo.
"Antaŭe, homoj donis sangon aŭ organojn por pluvivi," diras la nekonata voĉo. "Vivo® nur... humanigis ĉi tiun agadon. La infanoj de viaj genepoj reakiros sian liberecon. Intertempe, via familio estos suprenirinta en la socia hierarkio. Ĉiuj profitas."
"Vi precipe!" grumblas paĉjo.
"Vi faris la ĝustan elekton, sinjoro Kvint: tiu kontrakto garantias trankvilan kaj komfortan vivon al via filo ĝis li havos kvardek jarojn. Kiom da homoj povas tiel diri?"
"Kaj se fatalaĵo alvenos al li antaŭe?" demandis panjo.
"Neniu estas ŝirmita de akcidento. Oni ne povas gajni ĉiufoje. Trankviliĝu: nia firmao estas asekurita."
Li revenis al la nuntempo, en la salono de sia apartamento, kaj ne deturniĝis de la rigardoj de la du senditoj de Vivo®, kiuj rigardadis lin kun harstarigaj ridetoj.
"Mi ja kredas, ke vi provas priŝteli kvin jarojn de mi. La kontrakto planis, ke vi lasu min ĝis mia kvardeka jaro. Sed mi ĵus ĝisvivis la tridek kvinan."
Li jam planis profiti de tiu prokrasto por fuĝi kun sia filino, atingi unu el la senleĝaj areoj, kie li povus forviŝi ilian spuron.
"Ĝuste, sinjoro Kvint," diris la virino. "Tamen, la kontrakto inkludis punparagrafon. Viaj gepatroj, precipe via patro, ne montriĝis tiel kunlaboremaj kiel kondiĉis ilia kontrakto. Ilia sinteno kostis al vi kvin jarojn da puno. Mem legu tion."
La viro prezentis la paperon al li. Li alproksimiĝis kaj malkovris ĉe la malsupro de la paĝo paragrafon titolita "punklaŭzoj". Liaj okuloj nebuligitaj de kolero kaj larmoj ne povis deĉifri la etajn kaj streĉajn literojn. Senutile, evidente. Ĉi tiuj du aviduloj ne venis al lia hejmo sen esti certaj pri siaj rajtoj. La sola maniero eskapi de ili estus kapti la rustan pafilon venditan al li de ŝtelaĵokaŝisto

en la Buĉejokvartalo kaj malplenigi la ŝargilon en iliajn ventrojn. Kondiĉe ke tiu pistolo ne eksplodus en lia mano. Kondiĉe ke ili ne paralizus lin per la cerbaj neŭtraligiloj, per kiuj oni ekipis policistojn kaj aliajn cerberojn de la malsupra lando.

"Kion vi faros pri mia filino?"

"Se vi kunlaboros, ni reakiros ŝin en la aĝo de kvardek laŭ la kondiĉoj de la kontrakto. Ĝis tiam, ŝi ricevos meznivelan klerigadon en unu el niaj establoj."

"Ĉu... ĉu vi lasus al mi unu aŭ du tagojn por prepari mian foriron?"

Ironiaj ekbriloj dancis en la okuloj de liaj kunparolantoj.

"Ĉu vian foriron aŭ vian forfuĝon, sinjoro Kvint?" replikis la viro. "Ne iluziu vin: Vivo® posedas vian DNA-an spuron, vian distingilon. Danke al satelitoj kaj via bioblato, ni kapablos lokalizi vin, iri preni vin en iu ajn parto de la mondo, inkluzive de areoj ne regataj de internacia juro."

"Kredu nin, sinjoro Kvint, nepre utilos al vi sekvi nin sen kaŭzi malfacilaĵojn," diris la virino per akra voĉo. "Por vi kaj por via filino."

"Vi ne aŭdacus kun plena kora konvinko senigi ŝin je altvaloraj jaroj da vivo."

Kolervento leviĝis sub lia kranio. Kiel liaj propraj gepatroj povis vendi lin kaj lian filinon al tiuj aĉaj ŝakristoj de genoj? Ĉu mizero forviŝis el ili ĉian senton, ĉian amon, ĉian tenerecon? Dum kelkaj sekundoj, li estis tentata kuri al sia dormĉambro, kapti la pafilon kaŝitan en la tirkesto sub siaj ŝtrumpetoj, ĉesigi tiun ĉi absurdan komedion.

Jes, sed kiom da punojaroj kostus lia memmortigo al Lizbeto? Li devas prudentigi sin, reteni sin, oferi finofaran donacon al sia filino, al ŝi ebligi vivi kiel eble plej longe. Eble aĵoj ŝanĝiĝus antaŭ la fatala naskiĝtago de ŝia kvardeka jaro, ĉu? Eble la homaro retrovus sian komunan saĝon, eble la homoj ribelus kaj nuligus tiun tipon de kontrakto, eble... eble...

Li kvietiĝis kaj skuis la kapon rezigne.

"Lasu al mi almenaŭ la tempon vestiĝi."

"Kompreneble, sinjoro Kvint."

Li peze marŝis en sian dormĉambron. Li tremetis pasante antaŭ la pordo de Lizbeto. Ĉu ŝi kaptis ilian konversacion, kiel li aŭdis siajn gepatrojn kaj vizitanton dudek ses jarojn pli frue? Li forpuŝis akran tentiĝon eniri en ŝian dormĉambron. Krii al ŝi, ke li ŝin amas. Ŝi sin montris retenema lastatempe, kvazaŭ ofendita. Tio estas normala, asertis retaj psikologoj, konsulteblaj ĉiuhore, tage kaj nokte, por la modera sumo de dudek eŭroj: via filino tuj aĝos dek du jarojn, jen unuaj intencoj de sendependeco, kutimaj sindromoj de antaŭadoleskanteco.

Larmoj fluis sur liaj vangoj. Pensante ne plu revidi ŝin, ne plu brakumi ŝin, ne plu frandi ŝiajn vortojn, ŝiajn ridetojn, ŝiajn paŭtadojn, li preskaŭ kolapsis sur sian liton. Li estingis kiel eble plej bone novan eksplodon de kolerego. Li ne rajtis ribeli. Tiu fia kontrakto kun ĝiaj punklaŭzoj. Li vestis sin per mallertaj gestoj, jam dispecigita de bedaŭroj, eliris el la ĉambro, ŝanceliĝante antaŭeniris al la du oficistoj de Vivo®.

"Mi estas preta..."

La homoj leviĝis kaj eskortis lin al la halo. Taglumeto ektrairis la interspacojn de la persienoj. Ili paŝis sur la interŝtuparon kie du viroj vestitaj per la samaj grizaj uniformoj, oficistoj de la firmao komisiitaj bonvenigi vekiĝontan Lizbeton kaj konduki ŝin en ŝian novan hejmon. Ili kapklinante salutis siajn kolegojn antaŭ ol eniri siavice en la loĝejon.

Vivo® lasis nenion al hazardo.

Li evitis kontempli sian bildon en la granda spegulo alkroĉita al la muro de la interŝtuparo. Li ne plu apartenis al si.

Lizbeto malŝaltis la spionajn ekranojn. La du viroj en grizaj uniformoj jam eliris lasinte la dosieron facile videbla sur la tableto de la salono. Vekita per la tri eksonoj de la pordosonorilo, ŝi perdis nenion de la konversacio de sia patro kun la vizitantoj. Ŝi jam antaŭe plenigis la ĉambrojn per mikrofonoj, per kameraoj, per registriloj. Ŝi amegis spioni siajn gepatrojn kun iliaj kunparolantoj, kapti iliajn flustrojn, malkovri iliajn sekretojn. Ekde kiam ŝi estis sufiĉe aĝa por kompreni, ŝi suspektis, ke iam ŝia ekzisto dependos de la informoj, kiujn ŝi sukcesos kolekti. Ŝia patrino sin mortigis post la ekscio, per la antikva Reto, ke ilia familio estis vendita al Vivo® ĝis la

tria generacio. Tion Paĉjo neniel sciis kaj Lizbeto ja atentis ne malkaŝi al li. Ŝi havis la ideon reakiri la kontrakton per la mono el la sekreta konto de panjo – sekreta, pu! Ĉar mankis al ŝi kvindek mil eŭroj, ŝi proponis interŝanĝon al la firmao: ŝia definitiva libereco kompense de la cent dek unu mil eŭroj de panjo kaj kvin jaroj de la vivo de sia patro. Vivo® elturniĝis transformi ilian fikombinon en kontraktpunon. Neniu leĝisto ŝovus la nazon en la dosieron ĉar neniu plendo estus registrita.

Ŝi finfine sin liberigis de siaj gepatroj. Momenton ŝi timis, ke paĉjo sin mortigos en sia dormĉambro, antaŭtempa morto, kiu ruinigus ŝian planon. Ŝi antaŭe sekvis ĉiujn liajn movojn sur unu el siaj spionaj ekranoj, ŝi vidis lin heziti, lamenti, plori. Li tro amis sian filinon por riski ribeli. Ŝi sentis pri li nur indiferenton kun malestimo. Emocioj neniam embarasis ŝin. Vivo® prizorgos ŝin ĝis ŝi fariĝos plenaĝa – ekde la dekreto de la 16-a de novembro 2018, morala persono eblas esti zorganto de neplenaĝa fizika persono. Delogita de ŝiaj talentoj de informistino kaj intertraktistino, la firmao jam rezervis al ŝi oran postenon en siaj oficejoj de flosantaj urboj.

Lizbeto havis multan tempon por pripensi sian estontecon. Ŝi ellitiĝis je la sesa kiel kutime, kaŭriĝis ĉe la tableto de la salono, malfermis la dosieron, rapide kontrolis la dispoziciojn de la nova kontrakto kaj, kontenta, vigle iris en la kuirejon por prepari sian matenmanĝon.